


Kataluna Esperantisto



**NUMERO 329 (95)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO
2004**

Zamenhof-festoj

Grava asembleo

Kongres-gastoj

**Renkontiĝo
por progresantoj**

Semajnfina kurso

Novaj komiksoj

Kontraŭ desuprismo

Libroj

Signo-lingvoj


Hi ha una altra mundialització possible

El quart Fòrum Social Mundial, celebrat a Mumbai (Índia) del 16 al 21 de gener, va aplegar 80.000 persones de 2.660 organitzacions i 132 països.

Cal que ens en congratulem, no només perquè els esperantistes també hi vam estar molt ben representats, sinó també pel canvi de nomenclatura del moviment de resistència mundial, que de mica en mica bandeja el terme *antimundialització* (o el seu anglicisme equivalent d'*antiglobalització*), creat pels mitjans de comunicació, substituint-lo per un terme positiu i molt més escaient: *altermundisme*.

Els esperantistes som, de fet, un moviment profundament mundialista: ja fa una colla d'anys que seguim la consigna de "pensar globalment i actuar localment". I encara fa més temps que ens enorgullem del calidoscopi nacional de les nostres revistes i congressos. La revista *Monato*, per exemple, gràcies a Internet té redactors a 10 països diferents, correctors en 8, i col·laboradors en 45; la composició i impressió es fa a Flandes, i l'expedició –curiosament– des de diversos països alternativament, segons els costos.

Si la mundialització s'entén com una presa de consciència que tots estem en el mateix vaixell, i que els problemes i les desigualtats s'han de resoldre a escala planetària sense imposicions unilaterals dels més poderosos ni pretendre que només hi ha una manera de pensar i fer les coses, només ens en podem felicitar. □





**Ni deziras subteni
la literaturon verkitan
en aŭ pri esperanto,
kaj helpi la elekton de taŭga
esperanto-verko
por la libro-tago**

En ĉi tiu numero vi povos ekfrandi la novan elanon de nia asocio danke al nova, profesia, laborforto. En la komenco oni okupiĝis ĉefe pri aranĝoj, aparte en la instrua kampo. Sed estas akcentita ankaŭ ekstera agado, ĉu per diskonigaj aranĝoj, ĉu per dissemado de cirkuloj tra la gazetaro. Ĉiel ajn, la funkciado de la asocio plu dependas precipe de ties membroj kaj grupoj, kaj bildon de ilia aktivado vi trovos, kiel kutime, sur niaj paĝoj. Kompreneble, laŭ la sezono, la ĉefaj agadoj gravitas ĉirkaŭ la Zamenhofa tago kaj la jara asembleo, sed vi malkovros pli multajn, ekzemple longetan liston de aliĝoj al manifestoj: la streĉiĝinta politika situacio en nia lando vole-nevole speguliĝas en la agado de ties kulturaj asocioj.

Aliflanke, vi rimakos iom nekutiman enhavon: kvankam nia bulteno ĉefe okupiĝas pri la loka movado, ĉi-okaze rigardado ekteren okupas rimarkindan lokon. Unuflanke, ni taksas, ke malfermiĝo devas esti esenca sinteno de esperantistoj, kaj tion ni deziras substreki per niaj fronta kaj dorsa kovriloj. Aliflanke, ni deziras reliefigi kaj subteni la literaturon verkitan en aŭ pri esperanto, tiel ke ni esperas, ke la multaj libroj prezentitaj en ĉi tiu numero – kaj porkomencantaj kaj “normal-lingvaj” – faciligos al niaj legantoj la elekton de taŭga esperanto-verko por la libro-tago.

Hektor Alos i Font

Reagoj al Kataluna Esperantisto

Ni dankas al Arno Lagrange, ke li esperantigis plimulton de la artikolo pri Pujulà i Vallès de nia oktobra revuo kaj aldonis al Vikipedio, la mirinda reta enciklopedio multlingva, kiu jam atingis 10 000 artikolojn en esperanto; fakte li ne nur tradukis al esperanto, sed ankaŭ al la franca kaj, pli resume, al la angla. Ni dankas ankaŭ Polan Radion, ke ĝi parolis la 20an de januaro pri la intervjuo al Manel Vinyals aperinta en nia decembra numero.

Korektoj

Enŝteliĝis du lastmomentaj fuŝoj en nia pasinta revuo: la ĉi-jara kongreso ne okazos en Prada, kiel misertis la kovrilo, sed en Ceret, kiel tekstis la interna novaĵo; aliflanke, en la foto sur paĝo 9, Manel Vinyals staras maldekstre, dum Joaquim Marcoval dekstre.

Ĉi-numere kunlaboris: Jean Amouroux, Karles Berga, Joan Inglada, Ferran Marín, Ramon Perera, Christian Pinard, Pep Pou, Llibert Puig, Ramon Rius, Darío Rodríguez, Sylvie Roques kaj Dalmau Vallès.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne)
Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Ret-Info, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 SABADELL (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2004: Individua Abonanta Membro 35 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 75 eŭroj; Individua Dumviva Membro 750 eŭroj; Kolektiva Membro 75 eŭroj; Juna Membro 23 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell,
Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Arnald Massanas, Mateu Vic.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Òscar Puig, Luz Vázquez.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental),
Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nia agado

Omaĝo al Joan Amades

La antaŭ nelonge starigita fondaĵo Joan Amades lanĉis la preleg-ciklon *La mondoj de Joan Amades*, omaĝe al la plej grava kataluna folkloristo. Temas pri aranĝo, kiu okazos ĉiujare en Sant Quintí de Mediona (Alt Penedès).

La unua sesio de la serio okupiĝis pri la esperanto-flanko de tiu multdimensia figuro. Nome de KEA prelegis ĝia sekretario, Hektor Alos. Li ĉefe prezentis la strebojn por internacia lingvo ĝis la eldonado de la Unua Libro fare de Zamenhof kaj la pionirajn jarojn de esperantismo en nia lando, dum kiuj Joan Amades elstare aktivis: li eĉ fariĝis prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio kaj kunlaboranto de la Kataluna Antologio (kompreneble, en la ĉapitro “Popolkantoj”).

Post tiu unua prelego, la historiisto Ferran Aisa prezentis la rilaton inter Joan Amades kaj Ateneo de Cultura Popular. Tiu popola kulturorganizo atingis eĉ 20 000 membrojn kaj estis neniigita de faŝismo. Multe antaŭ tio, Joan Amades estis ties vigla membro kaj en ĝi li lernis esperanton. Notindas, ke tiu potencega ateneo fariĝis eĉ la tegmenta organizo la antaŭmilita Kataluna Esperantista Federacio, kaj ties elstaraj esperanto-membroj estis, inter multaj aliaj, Frederic Pujulà, Delfi Dalmau kaj Jaume Grau Cases. Ĝi eldonis en 1925 libreton de Amades en esperanto pri la katalunaj popolkantoj.

La aranĝon vigle finis la ensemblo Kaj Tiel Plu, kiu tre amadeske unuigas la internacian lingvon kaj la katalunan folkloron. Ĝi prezentis novajn kantojn baldaŭ endiskigotajn ĉe Vinilkosmo.

Tagmanĝo en Sabadell

Centro de Esperanto Sabadell rememoris la datrevenon de Zamenhof per komuna tagmanĝo la 13an de decembro en loka restoracio kun ĉeesto de 19 homoj. La etoso estis bona kaj frateca kaj oni bedaŭris la neokazigon de kutima kultura aranĝo, kio ne eblis ĉi-jare pro diversaj kaŭzoj. Oni celos plibonigi la datrevenon venontjare.

lp



Malstreĉiĝo post la prelegoj en Sant Quintí



Postprelega koncerto

Vespermanĝo en BEK

La 12an de decembro Barcelona Esperanto-Kontaktejo organizis vespermanĝon omaĝe al la kreinto de la lingvo. Temis pri preteksto por arigi esperantistojn el diversaj lingvoniveletoj, veteraneco kaj aĝoj. El dek anoncitoj partoprenis naŭ. La vespermanĝo okazis en nepala restoracio de la kvartalo Gràcia kun posta kaj noktuma vizito al muziktrinkejo Badlands. Esperanto estis vaste uzata apud la kataluna kaj la homoj glate babilis ĉefe pri esperantaj temoj. En la aero ŝvebis la sento, ke la partoprenantoj ŝatus implikiĝi en ontaj esperanto-projektoj, inter ili jam planata esperanto-festo en Badlands.

kb

Omaĝo en Amikoj de Unesko

La pasintan 17an de decembro la esperanto-sekcio de Amikoj de Unesko de Barcelono festis la Zamenhofan tagon.



Finfine, la momento tiel atendita alvenis kaj la kataluna grupo Kaj Tiel Plu ekkoncertis. Estis granda sukceso kaj ili devis eĉ reveni du fojojn. Danke al katalunoj, kiuj festis la antaŭan nokton en okcitanan trinkejo kaj interkonatiĝis kun neesperantistaj okcitanistoj, oni havis la plezuron ke du el ili partoprenis en nia festo.

Por fini tiun tagon, kelkaj daŭrigis en trinkejo kaj en restoracio antaŭ ol rehejmeniri.

Sylvie Roques

Partoprenis dek kvin homoj kaj ok aliaj esprimis sian deziron ĉeesti sed ne povis pro diversaj malhelpoj. Omaĝe, oni montris parton de la instrua materialo pretigita de s-ro Vilagran dum la multaj jaroj de sia gvidado de la sekcio. Kolazio kaj amika interparolo daŭrigis la aranĝon.

rp

Buntega zamenhofado en Tuluzo

La 7an de decembro okazis en Tuluzo la Zamenhof-festo. Pli ol centoj da esperantistoj el Okcitanio kaj Katalunio ĉeestis.

Matene, la plej kuraĝaj jam aktiviĝis: kelkaj por ordigi kaj prepari la diversajn salonojn, aliaj por helpi la du “ĉefkuiristoj”, Daniel kaj Majid, kaj kelkaj kromaj partoprenis la ĝeneralan kunvenon de la federacio “Meza Pireneo”.

Poste manĝado, kafumado kaj babilado: la distra programo komenciĝis.

Unue, la muzika koncerto de Bogumil Wlodarski kaj liaj lernantoj ĝojigis nin. Ili ludis diversajn stilojn: Bach, ciganan muzikon kaj eĉ ĵazon. Sekvis Flavie Audibert, kiu mirigis nin per mimoj kaj dancoj. Poste, la Tuluzo Teatra Trupo ludis “Forlasita”, teatraĵon esperante adaptitan de Rikardo Cash.

Paŭzo okazis antaŭ la ĉefa parto de la programo. Ĝi permesis al la partoprenantoj viziti la libroservon de Jorgos kaj la diskoservon de Flo. Ankaŭ tio permesis plu babili kaj interkonatiĝi kun esperantistoj dise loĝantaj.

Novaj kursoj

En Sabadell novembro komenciĝis nova elementa kurso laŭ la zagrebida metodo kun kvin lernantoj, kiu okazas po du horoj ĉiusemajne, kaj ili bone progresas, ĉar havas grandan intereson por la lingvo. Aldone, en februaro komenciĝos progresiga kurso, en kiu partoprenos almenaŭ la du lernantoj en la pasinta elementa kurso, de majo ĝis oktobro.

Amikoj de Unesko proponas la plej grandan gamon da eblecoj. Ses komencantoj lernas laŭ la BEK-metodo dum tri horoj semajne, kaj kvar laŭ klasike gramatika, po unu horo semajne. Mezan ciklon partoprenas du lernantoj kaj en konversacia rondo, okazanta ĉiujaŭde, averaĝe kunvenas kvar homoj.

Barcelona Esperanto-Kontatejo varbis kvin lernantojn por sia elementa kurso, komencinta la 1an de oktobro, per la sama kataluna deflankiĝo de la fama Zagreba Metodo uzata en Sabadell. La lecionoj okazas unufoje en semajno.

En Prada ekzistas du kursoj, komencitaj septembre. Ses progresantoj laboras per *Nouveau cours rationnel* kaj ekzercoj el reta lerniloteko de edukado.net. Du komencantoj sekvas la kurson DLEK kaj la komputilan *Kurso de esperanto* el Brazilo.

La grupo en Vilanova i la Geltrú ne organizas kurson, sed renkontiĝas ĉiulunde, vespere, kaj kutime legas tekstojn el *Vojaĝo al Esperanto-Lando* de Boris Kolker kaj tradukas.

En Tarragona ne ekzistas ajna instruado, sed la esperantistoj renkontiĝas unufoje monate por teni la kontakton kaj babili.

lp / rp / kb / cp / ji / fm / red

Glata asembleo

Dudekkelkaj membroj kunvenis por la jara asembleo en Amikoj de Unesko la 14an de februaro.

La estraro prezentis dudek-paĝan kajeron, kies enhavo estis elŝutebla el Interreto kelkajn tagojn antaŭe. Ties datreveno ŝajne iom mutigis la ĉeestantojn. La antaŭaj protokoloj, la agad-raporto kaj spezaro de la antaŭa jaro, same kiel la agado kaj buĝeto por la kuranta estis flue aprobitaj. Plej elstaras iom rimarkinda altiĝo de la kotizoj, parte por kompensi la pasintjaran frostigon kaj parte por permesi la atingon de la ĉi-jaraj defioj. En la renovigo de postenoj, eliris la estraron voĉdonantoj Anna Casadesús kaj Xavier Margais kaj vic-prezidanto Joan Inglada, dum estis akceptita Mateu Vic. Ankaŭ la kontrolo komisiono ŝanĝiĝis: Xavier Murcia kaj Sebastià Ribas estis anstataŭitaj de Christian Pinard kaj Luz Vázquez; longigas sian mandaton Óscar Puig.

Dum la asembleo estis distribuitaj aliĝiloj por la printempa renkontiĝo en Porta kaj por la aŭtuna kongreso en Ceret. Krome, la ĉeestantoj ricevis donace ekzempleron de la preleglibro de la kongreso en Sóller.

Internacia Televido



Post lunĉa paŭzo sekvinta la asembleon, Flavio Rebelo, ĉefredaktoro de la sensacia retportalo Ĝangalo, prezentis projekton de Internacia Televido en esperanto.

Temas pri la lanĉado de televido elsendonta, dum 24 horoj tage kaj 7 tagoj semajne, kvar-horan programon kiu ripetigos ses-foje: tiamaniere ĉiuj esperantistoj en la mondo, sendepende de siaj horzonoj, povos spekti la elsendon. La televido videblos rete, ĉar, laŭ la klarigoj,

tio postulas pli malmultan ekiparon, tiel ke la postulata investo draste malaltiĝas same kiel la elsendado en Brazilo, pro ties malaltaj salajroj sed altnivela teknologio. Eĉ esperantistoj kun mallarĝa ret-aliro povos spekti la programojn: laŭ la nuna teknologio, ju pli granda bendolarĝo des pli granda televid-fenestro en la komputila ekrano, sed eĉ normalaj modemuloj povos bone spekti kaj aŭdi la elsendojn.

La brazilano Flavio Rebelo rondvojaĝas prezentante tiun projekton dum monato kaj duono en Eŭropo kaj honorigis nin per tri-taga restado en Barcelono, kie li komencis sian turneon. Se sabate li prelegis en Barcelono, dimanĉe li tion faris en Montpeliero, lunde en Tuluzo, ktp. La ĉefa celo estas kolekti la bezonatan kapitalon por lanĉi la televidon (35 000 eŭroj); se la kolektita mono ne atingos la necesan sumon, la mono estos redonita al la investintoj. KEA ja peros la kontribuojn de siaj membroj.

Indas aldoni, ke la prezento estis parte filmita de la Barcelona Televido kaj novaĵo aperis en ties okcitanlingva informilo.

Kongreso en Ceret

La preparoj por la jubilea kongreso en Ceret antaŭeniras. Al la anoncita partopreno de Aleksander Korĵenkov, eblas aldoni la konfirmon de nova gasto: la vicprezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj fama skeĉ-verkisto Stefan MacGill. Krome la vesperojn plenigos la ensemblo Kaj Tiel Plu, kiu prezentos sian duan diskon, kaj la Teatro Trupo de Tuluzo, kiu premiere ludos la verkon *Familia Etoso*. Bonvolu baldaŭ resendi la akompanan aliĝilon.

Ceret, nia jubilea kongresurbo



Renkontiĝo por progresantoj

La 1an kaj 2an de majo okazos en Porta (Alta Cerdanya) semajnfina kurso por progresantoj. La celo estas paroligi homojn kaj informi pri la bazaj elementoj de la esperanto-komunumo: gazetoj, kongresoj, servoj, libroj. Tamen, ne ĉio estos instrua: oni planas nur iom streĉe labori sabate posttagmeze, kunkanti nokte kaj promeni dimanĉe matene. Aliĝilo estas sendata kun la revuo. Ekzistas tre limigita nombro da lokoj, do interesitoj bonvolu rapide sin anonci.

Semajnfina kurso por komencantoj

La 5an kaj 6an de junio okazos en La Sénia (Montsià) semajnfina kurso por komencantoj. Temos pri nova sperto por nia asocio, kiun oni taksas provinda: se sukcesa, ĝi certe ripetiĝos. La Sénia estas fekunda grundo, ĉar temas pri la loĝloko de niaj du mondvojaĝintoj, Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval, do principe taŭga loko por tia eksperimento.

Memore

La 4an de aprilo okazos la 20a datreveno de la forpaso de nia kar-memora pioniro Petro Nuez. Neniu restis indiferenta antaŭ lia entuziasmo en la disvastigo de nia lingvo kaj nepras elstari lian persiston paroli kaj paroligi ĉiujn nur en esperanto. Li posedis plurajn meritojn, sed eble la plej kortuŝa estas la fakto, ke liaj multaj disĉiploj memoras lin kun vera dankemo. Tutkore ni omaĝas la kunfondinton de KEA.

La 10an de februaro *L'Indépendant* aperigis leteron de la leganto Roger Danot el Perpinjano, kie, sub la titolo "La kataluna en la lernejon", li pledas por ankaŭ la instruado de esperanto.

ji/ja/cp

Retlista febro

Kvankam dum la jaroj 2002 kaj 2003 la nombro de mesaĝoj en la la ret-listo de KEA estis sufiĉe konstanta (ĉ. du tage), en decembro, januaro kaj komenco de februaro la mezumo eĉ randas triobligon. Januaro finiĝis per rekordo: 169 mesaĝoj. Ofta mesaĝado inter malsamaj homoj estas simptomo de vikleco, sed subitaj kreskoj povas samrapide ŝrumpi: ni vidos.

Tago de la gepatra lingvo

La Internacia Tago de la Gepatraj Lingvoj, establita de Unesko en 1999 por la 21a de februaro ĉiujare, estos nialande memorigita per elstaraj aranĝoj en Banyoles kaj elsendo de la programo Millenium en Canal 33 kun la partopreno de elstaraj lingvistoj. Por la okazo la komunikadcentro de Eŭropa Esperanto-Unio kaj Universala Esperanto-Asocio disvastigis deklaron, kiun KEA tradukis –konkrete, Guillem Portell– kaj diskon-igis rete.

ABC-Pack

La esperanto-eldono de la ret-portalo ABC-Pack (vidu nian antaŭan revuon) jam estas plene funkcianta. Kune kun ĝi estis publikigita ankaŭ la franclingva eldono, per kiu la retejo estas jam kvarlingva (hispana, angla, franca kaj esperanta).

Budoj dum la librotago

Paralele al la jam tradicia esperanto-budo en Sabadell dum la librotago, la 23an de aprilo, kaj instige de Barcelona Esperanto-Kontaktejo, KEA celas starigi librobudon en la barcelonaj Rambles. Homoj pretaj deĵori, bonvolu kontakti la asocion. Same, se oni deziras materialon por aliaj urboj, ne hezitu vin turni al ni (vidu la kontakt-eblecojn sur paĝo 2).

Informado progresas

Kvankam la agado de la asocio, danke al la engaĝiĝo de Jomo Milla, prioritatis la preparon de aranĝoj por la dua trimestro, ĝi ne neglektis informadon. Estis pretigita datumbazo kun pli ol cent adresoj, plimulte de gazetoj, sed ankaŭ de diversaj ret-listoj. Cirkuleroj estis jam senditaj pri la premio Dalmau kaj la vizito de Flavio Rebelo.

Esperanto en la gazetaro

El Punt de la 1a de decembro anoncis la enprenon de la grava kolekto de fakverkoj pri lingvoj, i.a. esperanto, de la scienculo Pau Ginés i Sala fare de la Biblioteko de Katalunio.

La 2an de januaro *Diari de Vilanova* prezentis en sia dorsa kovrilo la multfacetan aktivulon Joan Inglada, prezidinton kaj vicprezidinton de KEA, kies esperantisteco bone reliefiĝas.



Joan Inglada
laŭ *Diari de Vilanova*

Ĝojinde, la lingva nivelo de la uzata esperanto estis laŭdita en la novaĵ-grupo soc.culture.esperanto.

dr/red

Porlingvaj aliĝoj

En la lastaj monatoj KEA aliĝis al kvar diversaj iniciatoj. Ĝi subskribis komence de decembro la “manifeston por la efektiva normaligo de la kataluna lingvo kaj por la sociala uzo de la kataluna”, lanĉitan de la organizantoj de la 34a Renovigo de la Flamo de la Kataluna Lingvo kaj prezentotan al la kataluna parlamento. Iom poste KEA aliĝis al la manifesto de la universitata reto Joan Lluís Vives por la unueco de la kataluna lingvo en rilato al la lastaj agadoj de la hispana registaro starigi la valencian kvazaŭ apartan lingvon. Januare, ĝi aliĝis al la subtena kampanjo por la novfondita reto Culturalnord grupiganta la ĉefajn kulturajn asociojn en Nord-Katalunio por la nacia lingvo. Februare, ĝi aliĝis al la kampanjo “Por la kataluna en la lernejo”, kie proksimume 150 asocioj kaj pli ol 600 elementaj kaj mezaj lernejoj petas i.a. la nuligon de la dekreto de la hispana registaro deviganta duobligi la lernohorojn de la hispana lingvo en Katalunio.

Kun FOCIR

La 15an de oktobro 2003, la Federacio de Katalunaj Organizoj Internacie Agnoskitaj (FOCIR) prezentis en la palaco de la Kataluna Registaro informon pri la internacia diskonigo de la katalunaj asocioj, kiun oni ŝuldas al la laboro de la Esplor-Centro ISOR de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono kun la kunordigo de la sociologo Salvador Cardús, kiu mem klarigis la enhavon kaj la adoptitan metodon.

La prezentita informo, kajere distribuita, celas instigi la asociojn labori internaciskale kaj fariĝi internacie agnoskitaj, per kontakto kun aliaj katalunaj organizoj jam rekonitaj kaj per la jura helpo de FOCIR.

KEA, kiel membro de FOCIR, reprezentigis per Carme Cánovas, Mon Cardona kaj Llibert Puig.

lp

Ferriol Macip en BTV

Ferriol Macip, kompostanto de *Kataluna Esperantisto* kaj membro de la ensemblo Kaj Tiel Plu, fariĝis prezentisto de la okcitanaj novaĵoj en la Barcelona Televido, de la barcelona magistrato. BTV elsendas kvin-minutajn novaĵojn en deko da lingvoj, sabate kaj dimanĉe (kun ripeto meze de la semajno). Macip okupiĝas pri la okcitanaj novaĵoj en la gaskona dialekto: la novaĵojn en tiu lingvo oni alterne prezentas en lengadoka kaj gaskona variaĵoj, depende de la semajno.



Novaj albumoj de Arnau Torras

Post la blua kaj ruĝa albumoj kaj la bonetosa parentezo – aliformata libreto de Arnau Torras –, venas la vico de la du novaj kajeroj, flava kaj bunta, de nia plej vojaĝema samasocio. En ili li klarigas siajn travivaĵojn, ekz. en Afriko, dum sia loĝado en Senegalo, kaj en Brazilo, kie li pasigis preskaŭ duonjaron. Eĉ se desegne evidentiĝas maturiĝo en la aŭtoro, la celoj kaj zorgoj de lia D-ro Senesperanto restas tiel viglaj kaj fiksideaj kiel en la unua tago: kiel pleni la tutan paĝoblankon?

Arnau Torras: *Malpli da teksto kaj pli da sekso*. Sabadell, 2004.

Arnau Torras: *La vivo simplas*. Sabadell, 2004.

Arnau Torras: *Pli ol homo, esperantisto! La D-ro Senesperanto kaj la alternativa lingvo*, Zagreb, 1996. 48 p. 6,6 €

Arnau Torras: *La romantikulo en la 20a jarcento*. Zagreb, 1996. 48 p. 6,6 €

Arnau Torras: *La D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson*. Zagreb, 1998. 23 p. 4,2 €





Esperantisto de la jaro

Dafydd ap Fergus, direktoro de la Komunikadcentro de Eŭropa Esperanto-Unio kaj Universala Esperanto-Asocio en Bruselo, estis elektita "esperantisto de la jaro 2003". Tiun premion proklamas la internacia sendependa magazino *La Ondo de Esperanto* ekde 1998. La venkinto estas kimro lerninta la katalunan lingvon kaj membro de la retlisto de KEA. Invitite de nia asocio, li prelegis en la barcelona Unesko-klubo en aprilo 2002. Aliflanke, la redaktoro de *La Ondo de Esperanto* gastos en nia kongreso en Ceret.

Interreta rubriko



La libro de la prelegoj de la kataluna esperanto-kongreso en Sóller estas elŝutebla de la TTT-ejo de KEA. Ĝi entenas prezenton de la kongreso, tri prelegojn kaj poemon pri la bosnia milito deklamitan en ĝi:

www.esperanto-ct.org

Niaj kongresoj:

32a Kataluna Esperanto-Kongreso en Ceret:

www.esperanto-ct.org

Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Bilbao:

www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

Universala Kongreso en Pekino:

www.espero.com.cn/uk2004/e02.htm

Internacia Junulara Kongreso en Rusio:

www.tejo.org/ijk/

La paĝaro de Terminologia Esperanto-Centro havas ligilojn al fakaj vortaroj en esperanto, kaj multe pli:

gxangalo.com/terminologio/index.php

Dudek-lingva retpaĝaro "lernu!" enhavas esperanto-kursojn en tri niveloj, vortarojn, virtualan klasĉambron, ludojn, ekzemplojn de esperanto-literaturo kaj muziko, aliajn lerno-helpilojn kaj viglan komunumon de uzantoj kaj lingvohelpantoj:

www.lernu.net

Unu el la plej grandaj indeksoj de paĝoj en esperanto, kun diversaj servoj en kelkaj lingvoj:

www.esperanto-panorama.net

Multaj gravaj vortoj de esperanto devenas el la greka: vi povas legi interesan eseon de Angelos Tsirimokos pri ĉi temo en:

purl.oclc.org/net/grekajvortoj

Interesaj dokument-bildoj pri la historio de esperanto:

www.uea.org/dokumentoj/bhh/reta_muzeo.html

Retaj librejoj el kiuj oni povas senpage elŝuti librojn en esperanto: la plej grava estas la librejo de Franko Luin:

www.esperanto.nu/eLibrejo

sed ankaŭ ĵus aperis la nova librejo Torixoreu:

www.lujz.org/libro/node1.html

Darío Rodríguez

Kontraŭ desuprismo

Dalmau Vallès

Katalunoj spertas pri altrudiĝo de lingvoj. Inter aliaj rimedoj, ni memoru du: la devigan instruadon en la lernejoj, por ke homoj bone konu la celatan lingvon, kaj ĝian praktike devigan uzadon en la laborejoj kaj en la ĉiutaga vivo.

Ni imagu por momento, ke pro *deus ex machina* Eŭropa Unio oficialigas la devigan instruadon de esperanto en siaj membroŝtatoj. Post kelkaj jaroj necesaj por prepari instruistojn kaj diskonigi la lingvon al unua generacio de abiturientoj esperanto fariĝas postulata de la entreprenoj kiel ne malhavebla lingvo de la internacia komerco. Junuloj, kiuj lernadis ĝin dum jaroj, bonege scipovas la lingvon – facilegan, ĉar tiucele konstruitan. Ili krome ofte uzas ĝin en la laboro. En tutmondiĝanta socio, ĝi fariĝas lingvo de amikiĝo kaj de amuzado: distraj varoj aperas en esperanto (muziko, filmoj k.a.). Ĝi fariĝas, do, ĉiutaga lingvo ankaŭ ekster la laborejo.

Lingvo bonege konata (preskaŭ tiel bone kiel la denaska) kaj ĉiutage uzata – kiu ajn ano de malplimulta lingvo scias, kion kuntrenas tiu koktelo: lingvo-anstataŭo je pli aŭ malpli fora perspektivo.

Ĉu esperanto, do, pro sia pluroble pli granda facileco, estos nepre lingvo ĉiovora, okaze de sukceso? Ĉu vere tian solvon de la “monda lingvoproblemo” celas esperantistoj konscie aŭ ne? Esperanto, se ĝi venkos, ja havos ĉiajn eblecojn por anstataŭi ĉiujn aliajn lingvojn.

Fronte al tiu perspektivo eblas du sintenoj poresperantaj: fajfi pri la likvido de lingvoj, kiel plia ŝtupo fata al tutmondiĝo kaj maldiversiĝo, aŭ postuli, kune kun la instruado de esperanto, la enkondukon de antidoto kontraŭ ĝiaj negativaj postsekvoj okaze de eventuala fina venko, nome la aldona kaj samtempa enplantado de ekolingvismaj valoroj: esperanto ne estu nur genia pintverko de lingva inĝeniero por transponti la lingvajn barojn, sed ĝi esence komprenigu la riĉon de la kultura bunteco kaj la tristegon de mondo unuarba, unuvesta, unumora, unupensa kaj unulingva. Tio postulas penadon, ĉar diverseco estas pli malfacile mastrumebla ol betona egaleco: se homoj unulingve

kapablas vivi, postuli la lernadon de almenaŭ alia lingvo estas fakte agi kontraŭ la natura homa pigreco. Nur tre forta celkonscio permesus tion... kaj, kredeble, ankaŭ la enkonduko de fortaj limigaj leĝoj por protekti la naciajn lingvojn kaj permesi al ili sociajn monopolojn (legu tute same, ĉu temas pri esperanto, la hispana, la angla aŭ la ĉina – nur tio, ke esperanto, per sia simpleco, riskus multege plirapidigi la procezon).

Desupra riveligo de vero kaj la evangelizado de la popolo pri ĝi pere de lernejoj programoj ne ŝanĝas la fortegan inklinton de la homa naturo al la malplej laborpostula solvo: drasta unulingveco. Fakte politikistojn plej verŝajne oni ne konvinkos pri la esenco, t.e. efektiva lingvoegaleco – eble oni eĉ ne zorgos pri tio, ĉar gravas iel ajn trapuŝi esperanton, ne esoteraj strangaĵoj de minoritatuloj. Kaj kredeble politikistoj plej multe interesiĝos nur pli tradukokostoj kaj ekvilibro inter la grandegaj naciaj lingvoj: protektado de lingva diverseco alfluigas eĉ malpli da voĉoj al eŭropa politikisto ol kampanjo por konservi koralon en oceaniaj insularoj. Nur iom-post-ioma klerigado kaj ŝanĝado de la mensoj, per desubaj metodoj, permesus la kvalitan salton, kiu ebligus la alprenon de esperanto sen la longterma buĉado de ĉiuj aliaj lingvoj. Desuprismo certe tion ne faros.

Restas fakte nur la dubo, ĉu entute desubismo vere tion certigus.... ĉu entute ni prefere rezignu pri ĉia fina venko, ĉar la homaro ankoraŭ ne pretas, kaj ĝi igus mirandan ilon kiel esperanton kulturmortiga rimedo? □

Desuprismo: strebado konvinki la decidpovulojn pri la avantaĝoj de esperanto kiel komuna lingvo por la homaro kaj tiamaniere atingi la finan venkon de esperanto.

Firdaus Ŝukurov
Taĝikio

**Sabaton, 20an de marto,
18a horo**

Amikoj de Unesko
Mallorca, 207 pral. - Barcelono



Tarokoj kaj Epokoj eĉ ne la vortoj savos nin?



Tarokoj kaj Epokoj; malfacilas skribi pri ĝi, kun mia tuta sincero. Oni ne devus alfronti la legadon de ĉi tiu libro kun konvencia pensmaniero, ĉar unuavide ĉi tiu verko ne estas strikte biografio, romano, poemaro, ankaŭ ne artikolaro, nek lingva enciklopedio aŭ manlibro pri vivo (kiuj certe abundas en nia Esperantio). T.k.E. estas miksaĵo, loza kunfandaĵo kie renkonteblas iom da ĉiu el tiuj kutime apartaj ĝenroj. T.k.E. finfine estas Vivo. La aŭtoro pretendas doni al si portreton de sia vivo tia kia ĝi estas—aŭ devus arte esti—laŭ sia viva sperto.

En nia aktuala mondo plensencaj biografioj, arte, tutsimple ne “veras”, eĉ se oni povas aĉeti ilin en ĉiovendejoj kun la tuta certeco ke ili ne “postvivos”, ĉar la tempoj de Goethe, por doni ekzemplon, forpasis. Romanoj... Fari biografian romanon malfacilas, ĉar aŭ oni faras romanon aŭ oni faras biografion, do oni trafas la saman problemon. La aŭtoro de T.k.E. volas esti sincera, vive kaj arte sincera; sekve, la vojo kiun li elektas estas tiu de la fragmentigo. La vivo estas tiel, kiam oni ne havas firmajn teoriojn pri la ekzisto sur kiuj bazi la vivon kaj la arton. Nia tempo

ĉisence estas perdita. En T.k.E. oni komprenas la signifon de ĉi tiuj teruraj vortoj.

Kio restas do finfine en nia mondo? La unuopeco, la sanktega unuopeco kiu analizas ĉion, la aliajn kaj la kozojn. Necesas ia ligo por kunigi ĉiujn elementojn en vivo: tiu estas amo. Sed ankaŭ realisme amo ne estas Amo en T.k.E. sed konstanta kaj neelĉerpebla aspiri al tiu ideo. La aŭtoro observas ĉiujn siajn amrilatojn kaj konstata ke plenumiĝo ne efektiviĝis en lia ekzisto malgraŭ ĉiuj liaj bonaj deziroj. Volupto kaj sekso estas gravaj en la homa vivo. La aŭtoro analizas ĝisfunde sian rilaton kun ĉiuj siaj konitoj. Same kiel li skribas pri politiko, ludkartoj, lingvoj, ekologio, naturismo (ĉiuj kulturaj eroj de sia vivo). Grandparte la fundamento de ĉi tiu verko estas la itala Renesanco. Ne hazarde sed por malkaŝi sin, mi opinias, Declerck citas Danton je la komenco kaj poste ankaŭ Fiĉinon. Declerck vidas ke en nia mondo ne ekzistas fundamentoj, tial li serĉas ilin en la estinteco, grandparte en la Humanismo. Lia konceptiĝo pri la amo estas renesanca same kiel lia ideo pri la volupto. Kiel ĉiu humanisma homo, Declerck faras retrospektive serĉon el sia vivo, komprenas ke la belo estas la motoro de la mondo kaj ke la volupto kondukas al la amo, kaj la amo al la vera scio. Tiel lia verko centriĝas sur la arta beleco (poemoj, pentraĵoj) kaj la natura beleco, la beleco kiu estas virinoj kaj la beleco kiu ĉirkaŭas lin. Ĉio validas por serĉi la duoblon “Vero/Belo”, tial Declerck parolas al ni pri esoterismo, tarokoj. Finfine kreitaĵoj de la moderna homo, de la renesanculo. Sed ironie, nia reala mondo estas malsama, kaj tiam evidentiĝas la granda fiasko,

la fragmentigo, la realo kiu perfidas aŭ kaŝas la “Veron”. La aŭtoro mem konfesas: Finfine mia verko ne estas eble alio ol “vortludo”.

Kaj la recenzisto nur povas demandi al si, kiel implicate la aŭtoro: “eĉ ne la vortoj savos nin?”. Kompreneble, la solvo ne estas facile trovebla en ĉi tiu libro sed ĝi restas samtempe kaŝita ene de ĝi kaj vi leganto devas malkovri ĝin en vi.

Ramon Rius

Christian Declerck: *Tarokoj kaj Epokoj*. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2002. 655 paĝoj.

Bonegaj krimromanetoj

Finfine aperis la tre atendita kvara kaj fina romano de sezonaj krimoj de Sten Johansson. La serio naskiĝis antaŭ ses jaroj per *Falĉita kiel fojno*, kaj de tiam regule ĉiun duan jaron nova volumo atingas niajn libroservojn kaj ankaŭ la bretojn de la fidelaj legantoj de Johansson.

El lingva vidpunkto, temas pri imitinda modelo: li uzas normalan, modernan, flekseblan kaj riĉan lingvon. Ĉe li oni ne trovas lingvajn eksperimentojn (krom se li ŝercas), kaj male tute modernan ĉiutagan frazeologion: antaŭ la okuloj de la leganto pasas vicoseriaj domoj, poŝaj aŭ laŭparolaj telefonoj, bulvardaj ĵurnaloj, trejnŝuoj, ktp.

La enhavo same modernas: forgesu pri la nebulplena Londono de antaŭ pli ol jarcento aŭ pri la antaŭmilita Los-Anĝeleso. Ni troviĝas en la modernega sveda socio, fandejo de homoj el multlandaj devenoj, kie ekzistas problemoj kiel rifuĝintoj, nov-nazioj kaj droguloj, kie kuniĝoj facile displitiĝas kaj ofte neniam leĝiĝas.

La romanojn ligas la samaj roluloj: komisaro Roger Svedberg kaj inspektoro Tom Jankéus. Ĉefe la dua fariĝas aparte simpatia, pro iom specialaj parolformoj kaj ĉefe fajna ironio. (Humuro, fakte ne mankas en la libroj, ekzemple, kiam en unu el ili la aŭtoro mem aperas kiel suspektato.) Ili loĝas en la ĉebalta urbo Kalmar, de kiu dependas la apuda insulo Oland, sed foje la esploroj portas ilin en aliajn partojn de Svedio, eĉ foje eksterlande.

Nepre legu la librojn: ne multe gravas la ordo, krom eble prefere lasi la lastan (*Memor' mortiga*) por la fino. Temas pri nelongaj historioj, bone plektitaj, tuj kaptantaj la atenton. Kaj malmultekostaj. Kutima leganto en esperanto povas senprobleme forvori unu en posttagmezo. Legu, nepre legu!

Hektor Alos i Font

Sten Johansson: *Falĉita kiel fojno*. Al-fab-et-o, Skövde, 1997. 76 paĝoj. (Somero)

Sten Johansson: *Trans maro kaj morto*. Al-fab-et-o, Skövde, 1999. 80 paĝoj. (Aŭtuno)

Sten Johansson: *Neĝo kaŝas nur...* Al-fab-et-o, Skövde, 2001. 80 paĝoj. (Vintro)

Sten Johansson: *Memor' mortiga*, Al-fab-et-o, Skövde, 2003. 80 paĝoj. (Printempo)

Facilaj rakontoj

Sten Johansson estas ankaŭ verkinto de legolibroj por lernantoj kaj infanoj. Tre rekomendindas la lanĉita serio de Katrina: *La krimo de Katrina* kaj *Vojaĝo kun Katrina*.

El lingva vidpunkto, la libroj estas tre bone ŝtupitaj: kreskanta malfacilo vort-trezora kaj sintaksa, glosoj post ĉiu

ĉapitro kaj klariga postparolo por la instruistoj. Kvankam la *vojaĝo* konsiderinde pli longas ol la *krimo*, la du libroj estas tute samnivelaj: ili deiras de la sama tre baza nivelo de lernanto finintan sian unuan elementan kurson, kaj eĉ pli frue – post tri-kvar monatoj la lernantoj povus uzi ilin kiel interesajn kaj tre utilajn kromlegaĵojn.

Enhave, kiel ĉiuj libroj de Johansson, la intrigoj ĉiam montriĝas interesaj kaj aktualaj: ili spegulas la modernan kaj buntan svedan socion kaj la sentemon de la aŭtoro pri la nunaj problemoj de lia lando – feliĉe sen iu ajn prediko! Tial, malgraŭ iom ripetemaj kaj ekzercigaj unuaj ĉapitroj, la libroj estas plaĉaj ankaŭ por nekomencantoj (ĉefe la dua): ili forlegiĝas en momento.

Hektor Alos i Font


Sten Johansson: *La Krimo de Katrina*. Al-fab-et-o, facil-lega serio, Skövde, 2001. 36 paĝoj.

Sten Johansson: *Vojaĝo de Katrina*. Al-fab-et-o, facil-lega serio, Skövde, 2002. 60 paĝoj.

Kristoromano

La helikrapide aperanta Plena Verkaro de Manuel de Seabra proponas interese gan trian eron: *La tago kiam Jesuo perfidis Judason*. Jes ja, tute ne temas pri akuzativeraro. La ŝoka titolo, eble ofenda por kelkaj, tuj instigas al legado.

Staras antaŭ ni romano, t.e. fikcia verko. Surbaze de la konataj tekstoj priskribantaj certan judan profeton komence de nia erao kaj de samtempaj dokumentoj, la aŭtoro ŝpinas interesan fadenon kaj rakontas ĝin atentokapte. Nu, se spuri lian



bibliografion, kiel tradukisto li ja bone konatiĝis kun diversaj materialoj, kiel juda mitologio, kristana sakrala historio kaj pluraj historiaj libroj pri antikveco; nelaste, indas aldoni la genian romanon de Bulgakov *La majstro kaj Margarita*, kiun li redonis katalune.

La historio de Jehoŝua bar-Jozefo estas vaste konata en nia kultura medio, eĉ de la plej striktaj ateistoj – aŭ eble ĉefe de ili. Tial romano surbaze lia vivo malfacile vekas intereson: elnodiĝon ĉiu scias (kaj la romano tute ne surprizas tiurilate). Seabra ĝuste tranĉas rekte en la karnon: li ne nur renversas la titolon, sed eĉ aŭdacas komenci per Epilogo. Ĝi longas fakte preskaŭ duonon de la libro kaj priskribas la konatan rakonton pri la eniro en Jerusalemon, la vizito al la tempo, la kaptiĝo kaj la juĝado fare de Poncio Pilato antaŭ homamaso.

Malnova afero en nova livero. Temas iel pri romanigita biografio: Seabra baziĝas ja sur la kvar kanonaj evangelioj, sed ankaŭ eksterbibliaj informoj aldoniĝas, i.a. el la manuskriptoj el la Maro Morta, kaj la kreemo de la aŭtoro. Krome, la uzo de la personaj nomoj en la hebrea aŭ aramea iel helpas al la leganto apartiĝi disde tro trivita rakonto kaj foje preskaŭ pliverŝajnegas

ĝin (parenteze: strange, virinaj nomoj aperas de tempo al tempo ne konsenkevece esperantigitaj). Sekve, aferoj okazas kiel konate, sed eble ne pro la laŭdiraj motivoj: la aŭtoro lerte disvolvas paralelan politikan intrigon, kun eventualaj sekvoj teologiaj. Tial ĉe la fino, indas retroiri al la Prefaco kaj esplori la kialojn de la rakontitaj okazaĵoj.

Temas ja pri bona romano, lerte rakontita, en lingvo malkriĉa. Eble kelkajn kristanojn ŝokos la eblo krei romanon el bibliaj rakontoj, sed mi trovis la rezulton ege leginda kaj varme rekomendenda.

Hektor Alos i Font

Manuel de Seabra: *La tago kiam Jesuo perfidis Judason*. IEM. Serio Originala Literaturo 34. Manuel de Seabra, Plena Verkaro 3. Vieno, 2001.

Strangsona sciencfikciaĵo



Jordi Solé i Camardons, renoma socilingvisto konata inter la esperantistoj kiel verva subtenanto de nia ideo, publikigis sian duan romanon ĉe 3i4, la plej grava valencia eldonejo.

La sindrome dels estranys sons estas multipa verko: sub masko de sciencfikcia romano – la alia maroto de la aŭtoro –, ĝi reekzamenas la plej diversajn lingvoteoriojn cele al la kompreno kaj eventuala superado (ni ne diru “resaniĝo”) de stranga sindromo etendiĝanta sur la Tero kvindekono da jaroj post la nuna tempo. Individuoj ial subite ĉesas komunikiĝi homalingve kaj sukcesas eldiri nur nemalĉifreblajn sonojn; ili ankaŭ ne povas skribi, sed perfekte komprenas la aliajn. En la manoj de ekz. Ionesco, la afero disvolviĝus tute alimaniere, sed Solé, fakulo pri historio de socilingvistiko kaj specialisto pri lingvoj en sciencfikcio, profitas la okazon por menciigi preskaŭ ĉion diritan science kaj sciencfikcie pri lingvoteorio, dulingveco, lingvoanstataŭo, parolmalsanoj, ktp, kaj samtempe analizi, kiel sociaj grupoj reagis al diverseco, i.a. lingva. Alitavole, multas referencoj al nuntempaj konataj verkistoj, politikistoj, okazaĵoj, ofte per nur iom ŝanĝitaj nomoj sed tre evidentaj; ankaŭ, ekzemple, Camacho kaj Ertl same faris en esperanto. Eĉ la vilaĝo de la aŭtoro tiel travideble maskiĝas.

La libro havas diversajn aludojn al esperanto. Eĉ la ĉapitron 36 antaŭas citaĵo de Zamenhof kaj okupiĝas pri esperanto kaj esperantistoj, kompreneble tre favore.

Homoj interesiĝantaj pri ĉio lingva trovos tiun romanon interesa, kaj interesatoj pri nuntempa (lingvo)politiko certe amuziĝos pri la multaj aludoj, ofte spritaj, en la verko.

Pep Pou

Jordi Solé i Camardons: *La sindrome dels estranys sons*. 3 i 4. Col·lecció El Grill. València, 2003.

Les llengües de signes



En el món existeixen moltes llengües de signes, utilitzades principalment per uns 70 milions de persones sordes que hi ha arreu del planeta. No es tracta de llengües planificades, sinó que habitualment són idiomes del tot naturals, que s'han creat de la mateixa manera que s'han format les llengües ètniques. Acostumen a assemblar-se entre si més que no ho fan les llengües naturals que coneixem, tot i que les diferències poden ser molt considerables. Tampoc són variants de les diferents llengües parlades, sinó idiomes autònoms, encara que relacionats amb una llengua que es parla en el territori respectiu. Així, per exemple, "un tallat" ('cafè amb un raig de llet') es representa gestualment a Catalunya movent els dits en forma de tisora, o "un quinto" (de cervesa) s'expressa com si un soldat saludés el superior. Molt sovint, però, no hi ha relació entre llengua oral i gestual: l'expressió "a vegades" s'indica en la llengua de signes catalana donant copets amb una mà sobre l'altra, mentre que, per exemple, en l'espanyola, es mouen els dits amunt i avall.

Com totes les llengües, tampoc les de signes són uniformes: hi ha també variants territorials –dialectes, en podríem dir– dins d'una mateixa llengua. I les fronteres dels idiomes orals no coincideixen necessàriament amb les dels gestuals. No existeix, per exemple, una única llengua de signes anglesa: cada país anglòfon té una llengua de signes pròpia.

Hi ha, també, una llengua de signes internacional, coneguda com "gestuno", que va impulsar la Federació Mundial de Sords el 1951. El 1973 un comitè va normativitzar un sistema de signes internacional i el 1975 se'n

va editar un llibret. "Gestuno", però, no té una gramàtica normativa establerta, per la qual cosa hi ha qui afirma que no és veritablement una llengua: en una conversa en "gestuno" els interlocutors poden servir-se de la gramàtica de qualsevol de les llengües de signes. Actualment s'està treballant sobre una llengua de signes internacional basada en "gestuno" i l'esperanto.

El tema de la llengua de signes catalana ha aparegut darrerament a la premsa del país, en crear-se una plataforma per preservar-la a causa de la seva ràpida minorització: molts productes que actualment es poden trobar utilitzen la llengua de signes espanyola i, per altra banda, com que no hi ha prou centres d'ensenyament, molts nens del país es veuen obligats a estudiar a l'estranger. Tot i que el Parlament de Catalunya ja va aprovar una proposició de llei sobre la llengua de signes catalana el 1994, no se la té en compte a nivell de l'Estat espanyol. Per esmentar un cas recent, en el voluminós *Llibre blanc sobre la llengua de signes en el sistema educatiu*, presentat per la Confederació Nacional de Sords Espanyols i el ministeri d'Educació, hom hi dedica tant sols un parell de línies.

Actualment hi ha a Catalunya un miler de nens sords però només un centenar d'ells pot estudiar amb un sistema educatiu bilingüe, verbal i sígnic, ja sigui en un dels dos centres d'educació primària específicament per a sords (a Barcelona i a Sabadell) i a l'únic centre d'ensenyament secundari que disposa d'interprets de la llengua de signes. □

